

INTER LUPOJ KAJ LOLO

Artikolo publikigita en la revuo ADISTA de la 25a de februaro 2012

La krakadoj kiuj alvenas el la sanktaj palacoj ne povas ne pensigi nin pri la admono de Jesuo: "se domo estas dividita kontraŭ si, tiu domo ne povas stari" (Mk 3, 25). La situacio devas esti vere serioza se eĉ la ĵurnalo "L'Osservatore Romano" ("La roma observanto"), forlasinte la softan kurian lingvaĵon, priskribas nian Papon Ratzinger kiel "pastron kiu ne retropaŝas antaŭ la lupoj", kaj priparolas "papadon kiu eniros la historion" dissolvante kvazaŭ fumon la kliŝojn malfacile forviŝeblajn kaj kontraŭstarante senrespondecajn kaj malindajn kondutojn". Laŭ la "Osservatore" la agado de la Papo "estis karakterizita de renoviga kaj puriga laboro kiun Li daŭrigas kuraĝe, per persisto kaj pacienco, konsciiĝinte ke dumnokte en la kampon la malamiko semas lolon. Pro tio la Papo indikas sen laciĝi la neceson de senĉesa renovigo...". Tie ĉi estas klara la aludo al la internaj streĉitecoj, "kiujn oni devas scii ekkapti kiel okazon de purigo por la Eklezio". (L'Osservatore Romano, 15an de februaro 2012).

"Kiun el la profetoj viaj patroj ne persekutis?" (Agoj 7,52). La respondo al la krio de Sankta Stefano povas esti la elirpunkto por tiu proceso de purigo kaj renovigo kiu necesas al la Eklezio. La profetoj ĉiam denunciis tiujn paŝtistojn kiuj, estante vokitaj zorgi pri la ŝafaro kiun al ili konfidis la Sinjoro, anstataŭe sin tenas kiel "lupoj, kiuj disŝiras kaptitaĵon, verŝas sangon, pereigas animojn, por akiri profiton" (Jezĥek 22,27). Ili alproprigis al si la popolon de Dio kondukinte ĝin al ruiniĝo. En la nomo de la Sinjoro ili ekspluatas la popolon, ĝin humiligante pro ilia sojfo je povo, ili ja estas nesentemaj pri la malfacilaĵoj kiujn ili trudas kaj pri la suferoj kiujn ili kaŭzas. Sed la popolo, eĉ se ĝi estas subigita pro la timo, tamen ĝi ĉiam gardis la esperon je liberiga Paŝtisto. La estroj estis obeitaj sed ne aŭskultitaj ("sed la ŝafoj ne aŭskultis ilin", Joh.10,8) kaj, kiam aperas Jesuo la homamasoj rekonas en Li la liberigan Paŝtiston, ĉar dum la paŝtistoj-lupoj por sia avantaĝo humiligas la popolon, Jesuo por la bono de la homo ne hezitos oferdoni sin mem. Jesuo povas sin proklami paŝtisto, ĉar eĉ antaŭ ol esti paŝtisto Li estas la "Ŝafido de Dio"(Joh. 1,29). Nur tiu kiu oferdonas sian vivon por la aliuloj povas esti la paŝtisto de la popolo.

Lupoj estas ankaŭ la falsaj profetoj: "Gardu vin kontraŭ la falsaj profetoj, kiuj venas al vi en ŝafaj feloj, sed interne estas rabemaj lupoj" (Mt. 7, 15). Dum la profeto estas je la servo de Dio, la falsa profeto estas pagita de la laŭvica potenculo. La profeto denuncas la maljustaĵojn, la falsa profeto ilin kovras. La anonco de la profeto malkvietigas, tiu de la falsa profeto trankviligas (Jeĥez. 22,28). Sed la vesto de ŝafo neniam sukcesos kaŝi la dentegojn de la lupo. Tial la metodo por distingi la veran disde la falsa profeto estas la avantaĝo: "Se li postulas monon li estas falsa profeto" (Didakeo 11,6). Oni ne petas fideestilojn por konfirmi ortodoksecon. La kriterio pri

aŭtentikeco estas la kohero inter ĉio kion la profeto instruas kaj, aparte, la manko de ĉiu nenobla intereso (Miĥ. 3,5-6;Jeĥez. 13, 1-23).

Eklezio kapabla akcepti la voĉon de la profetoj, kaj ne ĝin estingi, tiu neniam timos la malamikon kiu semas la lolon. Jesuo, fakte, admonas la disĉiplojn pri la fakto ke pli danĝera ol la lolo semita de la demono estas la agado de la fervoraj servistoj kiuj celas iri por ĝin eltranĉi, riskante tiamaniere eltranĉi eĉ la tritikon (Mt. 13, 25-43), kaj la historio de la Eklezio instruas ke tro ofte, tiuj kiuj sin konsideras gardistoj de la Fido, tiuj ĉi ne nur eltranĉis la tritikon kune kun la lolo, sed, blindigitaj de sia pia fanatikeco, ili forigis la tritikon lasante ke la kampo estu plenigita per la lolo.

Alberto Maggi